# „Sorto, faru lokon al mi, lasu min fari ion por la homaro!”

Sándor Petőfi  ( Ŝandor Petefi ) montopinto de la poezio

– stilo popoleca, sed ne nur…

(inkl. analizo kaj deklamo de la poemo: La Juĝo – verkita en heksametroj)

1. Reformepoko kaj revolucio – 1825-1848
2. Poemoj kaj vivovojo de Sándor Petőfi
   ( 01.01.1823.- 31.07.1849. )
3. La 15a de Marto 1848 kaj la liberecbatalo
   ( 11.09.1848.- 11.08.1849. )
4. Poemo: La Juĝo - en heksametroj

- **Vaniĝinta plano**

Dum tuta vojo al la hejm'
mi planis en medit':
kiel saluti panjon en
momento de l' revid'.

Kion plej belan diri do
por la unua foj',
se l' brakojn, kiuj lulis min,
etendos ŝi kun ĝoj'?

Tra mia kapo kuris jam
da belaj pensoj mil,
dum stari ŝajnis tempo, sed
rapidis veturil'.

Enpaŝis mi, alflugis kaj
brakojn etendis ŝi;
surlipe, kiel arbe frukt',
senvorte pendis mi.

1844. (K.K)

# La Ebeno

Vin, Karpatoj krude romantikaj,
kie pinoj mornas, montoj turas,
mi admiras, sed ne amas. Mia
fantazio pri vi ne plezuras

**Sur marplata region' Ebena**
**estas mia mondo** hejmpejzaĝo
ĝin vidante , **la animo estas**
**aglo eskapinta el la kaĝo.**

Tiam mi ekflugas en imago
trans la teron, ĝis proksim' de nubo,
alridetas min la kampo plata
inter la Tibisko kaj Danubo.
...

Kie teron tuŝas la ĉielo,
bluaj pintoj de fruktarboj revas,
kaj, pli pale ol nebulkolono,
preĝejturo de urbet' sin levas.

Bela ter', almenaŭ al mi bela!
Tie naskis, lulis min patrino,
tie kovru min la ĉerktolaĵo,
tie kaŝu min la tomba sino.


(K.K.)

Ekaŭskultu ni kelkajn strofojn hungare:
[https://www.youtube.com/watch?v=n5QY_uSQvcw](https://www.youtube.com/watch?v=n5QY_uSQvcw)

Petőfi Sándor Az alföld.mp4



Lajos Kossuth ( Lajoŝ Koŝut ) - 1802-1894 . Patro de la hungaroj. Politika kaj spirita gvidanto de la revolucio kaj batalo por libereco.
Kiam la aŭstra kortego reprenis ĉiun rajton de la hungaroj per nova konstitucio en marto de 1849 , responde al tio La Sendependiĝa Deklaro estis eldonita la 14-an de aprilo kaj oni elektis Kossuth-on guberniestro-prezidento,
De 1861 Kossuth vivis en ekzilo en kaj ĉirkaŭ Torino. Li estis kromnomita ermito de Torino, al kiu pilgrimis hungaroj en lia vivo kaj poste rememore. (Parko Valentino 1889.)


TISZTELGÉS
Ambrosetti
Torino

# Kion signifas Sándor Petőfi por la hungaroj?

Ek, Hungaroj!

La amo kaj liber':
plej karaj sur la ter'!
Mi por mia am' oferas
vivoflamon,
mi por la liber' oferas
mian amon.

**Poetoj, ... tra fajro-akvo**
**ek por popol', ek por la ver'!**

**Surskribu por eterna**
**atesto kaj instru':**
**supre la ŝip' situas,**
**la akvo sube fluas,**
**sed estras ja la flu'!**



